# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

7a jarkolekto n-ro 9
novembro 1987

## A T E N T I N D A Ĵ O J

### ĜENERALA JARKUNVENO DE B.E.F.

je la 28-a de decembro en la teretaĝa kunvensalono de la kafejo Falstaff, Mausstraat 25 (apud la Borso), 1000 Bruselo (tel. 02/ 5119877).

Tagordo :
10 - 12h30 : estrarkunveno de B.E.F. + de Klubo 100
12h30 - 14h : tagmanĝo
14 - 17h : jarkunveno kun raportoj sekretariaj, financa, B.E.F.A., I.L.E.I., Klubo 100, Sonorilo, turisma komisiono. Diversaĵoj - elekto nova estraro.

### FESTO KLUBO 100

je la 12-a de decembro en Trefcentra, Oude Graanmarkt (je 500 m de la Borso), 1000 Bruselo.

Programo :
11h : artaprogramo
klavicenkoncerto de Kristiaan Van Ingelgem
la virĥoro Cantata sub la gvidado de Johan Haezaert kantos internacian repertuaron
ĉiu eksterlandano diros unufrazan mesaĝon en sia gepatra lingvo
12h30 : aperitivo
13h : komuna festa lunĉo
15h : prelego kun diapozitivoj de Emile Van Damme pri "La virino en la esperanto-poezio"
distro.

La partoprenkostoj por koncerto + aperitivo (150 fr.) kaj por lunĉo + trinkaĵo (250 fr.) estos destinitaj por konkreta helpo al afrikaj esperantistoj.

### ESPERANTO EN LA KOMUNIKILOJ

De la unua de januaro ĝis la unua de novembro 1987 aperis pri esperanto 10 mencioj, 54 malgrandaj artikoloj kaj 55 grandaj artikoloj.
En la radio okazis 24 elsendoj pri esperanto kaj en la televido unu mencio kaj unu televidprogramo.

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. - Jarabono: 150 BEF - Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 - Respondeca eldonanto *(verantwoordelijke uitgever)*: Monique Caestecker, Kerkstraat 86, 9940 Sleidinge.

**ESTRARO**

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 86, 9940 Sleidinge.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 06.
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 66.
Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.

**KOMISIONOJ**

**Financoj**: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 99 49.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf (052) 21 26 77.
**Libroservo**: Erik D'Hondt, Wilgstraat 25A, 9440 Erembodegem, tlf. (053) 77 44 97.



# PROTOKOLO

pri la F.E.L.-estrarkunsido de sabato la 14-an de novembro 1987 en Antverpeno

Ĉeestis : Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Alex Humet (AH), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR).
Senkulpigis : Hilde Vaningelgem (HV)

Komenca horo : 10h50

Prezidis ID; protokolis MC.

## 1. ANTAŬA PROTOKOLO

Aprobite.
punkto 3 : la projektletero de RR estas akceptita. RR forsendos ĝin.
punkto 4 : AH raportos pri tio en la sekvonta kunveno.
punkto 6 : la raporto de la kursgvidintoj kiun ni havas, estas verkita en majo 1987. Ni preferas atendi pli ĝisdatan raporton, kiu baldaŭ aperos, kaj tiam publikigos ĝin komplete en "Informilo".

## 2. SONORILO

- La projektletero farita de ID estas akceptita kun kelkaj kromaj aldonoj. MC kaj PP okupiĝos pri la fina prilaborado de la teksto.
- La estraro opinias ke oni devas kelkfoje reagi al malĝusta propagando de Sonorilo, ĉe la respondeculoj de la koncernaj publikaĵoj. ID kaj/aŭ PP okupiĝos pri tio. PP prizorgos anoncon en la organo de TEJO.

## 3. ESPERANTO-AGADO EN POELKAPELLE

S-ro Borghys volas esplori la intereson en Poelkapelle (Ieper) por esperanto-agado.

## 4. STUDOTAGO POR KURSGVIDANTOJ

okazos en Antverpeno je la 21-a de novembro inter la 10-a kaj la 17-a horo.

## 5. JUBILEA NUMERO DE ESPERANTO-PANORAMA

Ĝi aperos en decembro kaj estos unuflanke kompilitaĵo el tekstoj historiaj pri la 100 jara ekzistado de esperanto kaj pri la movado en Flandrio, aliflanke kun perspektivoj por la dua jarcento.

## 6. B.E.F.-KUNSIDO JE LA 28-A DE NOVEMBRO 1987

MC faros raporton surbaze de donitaĵoj de ID.

## 7. AFIŜO

ID kaj PP interkonsentos pri la prezo. Oni aparte sendos afiŝon al la prezidantoj de ĉiu grupo en Flandrio.

## 8. PERKORESPONDA KURSO DE F.E.L.

Ĝi estas preskaŭ elĉerpita. Se ni decidas daŭrigi tiun iniciaton, PP opinias ke la kurso devas esti adaptita laŭ enhavo kaj laŭ formo. La estraro opinias ke ni certe konservu la perkorespondan kurson ĉar preskaŭ ĉiu persono kiu komencas ĝin, finstudas.
PP, AH kaj Henny Jacques pristudos la eblecojn kaj raportos pri tio plej laste ĝis la fino de ĉi tiu jaro. Poste eblas kontakto kun Nederlando (el kie la nuna kurso originas).

La sekvonta estrarkunsido okazos sabaton la 5-an de decembro 1987.

## MALFERMA LETERO PRI LA PROBLEMO "SONORILO"

1) En 1962 Sonorilo fondiĝis kiel libroservo por kaj kun la kapitalo de Belga Esperanto-Federacio.

2) Ŝajnas al la estraro de F.E.L. ke la nunaj gvidantoj de Sonorilo, Monique kaj Patrick De Schepper, uzas havaĵon de la esperantistaro, ne por la bono de la Esperanto-komunumo kaj krome per diversaj agadoj malutilas al la Esperanto-vivo precipe en Flandrio.
Ni opinias ke nun ni devas - almenaŭ al la gvidantoj de la Esperanto-movado en Flandrio - konigi kelkajn nekonatajn faktojn ĉi rilate.

3) En Flandrio regas bona etoso de kunlaboro inter la F.E.L.-estraro kaj la grupoj. Okazas konstantaj interŝanĝoj de informoj, interkonsiliĝo, harmoniigo de aktivecoj. Nur la agado de Sonorilo okazas tute sendepende, sen kontrolo, sen interkonsiliĝo.

4) Ĉiujare fam. De Schepper organizas kursojn en sia domo. La nombro de la membroj de la grupo de Wilrijk ĉiam estis 3. En 1986 ĝi falis al 2. Se kursanoj aŭdis ion pri F.E.L., la informoj estis negativaĵoj. Se iu mendas ĉe Sonorilo libron eldonitan de F.E.L., oni ricevas komunikon ke tiu libro ne estas havebla.

5) Sonorilo regule eldonas informilojn pri Esperanto en la nederlanda lingvo. Iliaj broŝuroj enhavas multajn lingvajn erarojn kaj sekve ridindigas nin ĉe la ekstera publiko.
Krome ili mencias nur ke oni petu informojn pri kursoj ktp. ĉe Sonorilo. Neniam iu adreso atingas F.E.L. pere de ili.

6) En 1987 aperis tuta serio da gazetartikoloj kun la mencio ke oni ricevas ĉiujn informojn pri Esperanto, pri kursoj ktp. ĉe Patrick De Schepper. Pli kaj pli li emfazis ke ekzistas nur unu adreso por peti informojn. La kulmino estis gazetara konferenco en kiu Patrick parolis nome de la Antverpenaj esperantistoj. Tiel formiĝas kvazaŭ nova asocio apud F.E.L. !

7) Sonorilo krome sisteme konfuzigis precipe novulojn per anoncoj kun la mencio "nura oficiale rekonita". Tio estas kompleta fantaziaĵo, sed multaj homoj jam supozis ke bibliotekoj kaj librobutikoj devas mendi ĉe Sonorilo. Sonorilo fanfaronas pro sia membreco de "Verbond ter bevordering van het Vlaamse boekwezen" VBVB.
La paperoj por fariĝi membro de la sama asocio kuŝas pretaj ĉe F.E.L. de la komenco de 1987. La subskribo donus al F.E.L. la samajn eblecojn por aperi en la libroborso ktp. Sed la estraro de F.E.L. ne volis publike manifesti malinterkonsenton ĉar ĝi opinias ke internaj diskutoj malbonigas la etoson.

8) Neniu, eĉ ne ĝia administrantaro, antaŭscias pri la eldonaĵoj de Sonorilo, ekz. pri la eldono de libretoj de Witteryck kaj de Gezelle. Ambaŭ provokis indignon, la unua pro sia enhavo, la dua pro sia aspekto !

9) Depost novembro 1986 F.E.L. provas diskrete solvi la problemon per buŝaj kaj poste skribaj plendoj ĉe la administrantaro de Sonorilo. La rezulto estis nur pli provoka agado de Sonorilo.

10) La antaŭa direktoro de Sonorilo, S-ro Iserentant, ĉiujare transdonis la gajnon al B.E.F. De Schepper haltis tiun kutimon sen doni kontentigajn klarigojn.

11) Dum B.E.F.-kunsidoj evidentiĝas ke Sonorilo pli kaj pli kaŝas internajn informojn. La lasta raporto menciis nur procentaĵojn de vendoj en Valonio kaj en Flandrio.



12) Ni ne disponas pri ciferoj de Sonorilo. Sed por doni ideon pri la monkvanto, ni mencias kelkajn ciferojn de la F.E.L.-libroservo. De 1984 ĝis oktobro 1987 la stoko de F.E.L. kreskis de 130.000 fr. al 1.400.000 fr.
La laboroj estas plej grandparte farataj de profesiuloj en la centro. Tiuj laboroj forkonsumis 113.468 fr. en 1987, sed la pozitiva saldo de januaro 1987 ĝis oktobro 1987 sumiĝas je 337.391 fr.!
Ĉu vi komprenas ke la malalta membrokotizo, la disponigo de faldfolioj, informaj broŝuroj kaj leterpapero je duono de la prezo, la sendado de senpaga abono de Esperanto-Panorama al centoj da interesitoj, ktp. estas ebla i.a. dank'al nia libroservo ?

13) Malgraŭ netransdono de gajno, Sonorilo plurfoje petis monon por siaj eldonoj. Por la eldono de la lernolibro de S-ro Denoël, Sonorilo prunteprenis 100.000 fr. ĉe privatulo, ĝis la vendo eblas repagi. Post unuaj 20.000 fr. neniam plu venis repago !

14) Patrick De Schepper foje petas ĝiri monon sur sia privata bankkonto por libro eldonita de Sonorilo !

15) En 1977 La Verda Stelo eldonis Kristnaskan Triptikon kaj komisiis la vendon al Sonorilo. Kiam evidentiĝis ke Sonorilo forgesis pagi la venditajn librojn, oni informiĝis. Patrick asertis ke la stoko elĉerpiĝis ... kaj unu monaton poste anoncis la libron en "Last' aperis". Ankoraŭ nun, dek jarojn poste, Sonorilo vendas tiun ĉi eldonaĵon de La Verda Stelo.

16) Restas la prema demando : kien iras la gajno de Sonorilo ?

Ni intence ne finas ĉi tiun leteron per alvoko. Ni opinias ke niaj membroj estas sufiĉe kleraj por mem fari siajn konkludojn.

La estraro de F.E.L.

*PER MULTAJ GAZETARTIKOLOJ, SONORILO PROVAS KAPTI INTERESITOJN PRI ESPERANTO....*

# Esperanto-primeur op Jeugdboekenweek te Antwerpen

Aan 100 jaar Esperanto wordt te Antwerpen niet zomaar voorbijgegaan. Tijdens een persconferentie lichtte de h. Patrick De Schepper, verantwoordelijke voor de Esperantogroep Antwerpen en de boekhandel en uitgeverij Eldonejo Librejo Sonorile ASPC het programma toe.

Voor de eerste maal wordt deelgenomen aan de Jeugdboekenweek die loop van 13 tot 29 maart. Woensdag 11 maart vanaf 14u. is er voor de jongeren een kinderboekenfeest in de zalen van de Antwerpse zoo. Heel wat klassiekers uit de jeugdliteratuur, vertaald in het Esperanto, naast werken geschreven in deze wereldtaal zullen aan de jongeren worden voorgesteld. Pinokio, Jonathans Swifts «Liliputerland», Chinese volksvertellingen maar ook stripverhalen (Asterix e.a.) zullen aan de Esperanto stand ter inzage liggen.

Van 24 tot 26 april organiseert de Esperanto Federatie, afdeling Belgisch Spoorpersoneel, een Esperanto-weekend. Inlichtingen bij Lucien De Sutter, Kersbeeklaan 90, 1190 Brussel en op 25 juli zal een afvaardiging aanwezig zijn bij de opening van het Universeel Esperantocongres in Warschau. In 1887 werd op deze datum het eerste Esperantoboek gepubliceerd.

Alle informatie over Esperanto: de h. P. De Schepper, Doornstraat 22 — 2610 Wilrijk — Bp.

... Meer informatie over Esperanto — geschreven én gesproken — kan steeds bekomen worden bij de h. P. De Schepper, Doornstraat 22 Wilrijk. tel. 03/827.24.05.

... de vrede.
Wie meer inlichtingen wenst over Esperanto of een lijst wil bekomen van de Esperanto-leerboeken en literatuur, kan vrijblijvend de brochure over Esperanto aanvragen bij Eldonejo & Librejo Sonorilo, Doornstraat 22 te 2610 Wilrijk.

*TIUJ KIUJ PETAS INFORMOJN, RICEVAS PROSPEKTON, PLEJOFTE KUN MULTE DA LINGVAJ ERAROJ. LA NURA BELGA ADRESO KIU APERAS EN LA PROSPEKTO ESTAS TIU DE SONORILO MEM, POR EVITI KE LA NOVULOJ HAVU KONTAKTON KUN LA ORGANIZITA ESPERANTO-MOVADO...*

**• INDUSTRIE •**

Vele grote firma's gebruiken ook Esperanto, wij noemen er hier enkele van wereldformaat: Fiat, Philips, Agfa Gevaert, Ytong.

Dit zijn in het kort de feiten over de internationale taal Esperanto. Het kan dus anders. Het kan gemakkelijker, rechtvaardiger en goedkoper in de internationale communicatie. Ook hier geldt dat de beste manier om dat na te gaan is, het zelf eens proberen en eens te gaan kijken hoe Esperanto werkt. Als U wel eens wat meer inlichtingen over de internationale taal wilt hebben of wilt weten, hoe U Esperanto kunt leren en gaan gebruiken, dan willen wij U graag helpen.

**ELDONEJO & LIBREJO SONORILO**
**DOORNSTRAAT 22**
**2610 WILRIJK**

*NE ESTAS MIRINDE, KE LA AGADO DE SONORILO NE HAVIGIS AL LA MOVADO EĈ UNU PLIAN MEMBRON...*



SAMENGESTELD

DOOR

**voor iedereen**

| | | |
|---|---|---|
| ESPERANTO-CENTRUM NEDERLAND | Riouwstraat 172 | 2585 HW DEN HAAG (NL) |

ANDERE BELANGRIJKE ADRESSEN

| | | |
|---|---|---|
| ESPERANTO-CENTRUM VLAANDEREN | Arsenaalstraat 5 | B-2000 ANTWERPEN (B) |
| EŬROPA ESPERANTO-CENTRO | Montoyerstraat 37, bus 24 | B-1040 BRUSSEL (B) |
| UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO | Nieuwe Binnenweg 176 | 3015 BJ ROTTERDAM (NL) |

DE BROCHURE WORDT U AANGEBODEN DOOR:

↑ *PARTO DE LA ORIGINALA VARBILO, ELDONITA DE ECN, KUN BELGAJ ADRESOJ...*

↓ *KAJ LA KOPIOJ KIUJN DISTRIBUIS SONORILO, KUN ADRESOJ DE FEL KAJ EEC ZORGE KAMUFLITAJ....*

**voor iedereen**

Samengesteld door

| | | |
|---|---|---|
| ESPERANTO-CENTRUM NEDERLAND: | Riouwstraat 172 | 2585 HW Den Haag (NL) |

Andere belangrijke adressen:

| | | |
|---|---|---|
| ELDONEJO & LIBREJO SONORILO | Doornstraat 22 | 2510 WILRIJK (B) |
| UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO | Nieuwe Binnenweg 176 | 3015 BJ Rotterdam (NL) |

Deze brochure wordt U aangeboden door:

*SONORILO KONSTANTE MALHONESTE KONKURENCAS, DIRANTE KE ĜI ESTAS LA SOLA OFICIALE REKONITA ESPERANTO-ELDONEJO KAJ -LIBROVENDEJO*

Wilrijk 24.08.87

Estimata,

En nia lando ekzistas nur unu oficiala rekonita Esperanto eldonejo kaj librovendejo, nome *ELDONEJO & LIBREJO SONORILO* aspc. Nia librovendejo donas specialan ... la Esperantaj grupoj. Tiuj rabatoj estas des-

*LA ADMINISTRANTARO DE LA ASOCIO SONORILO PLURFOJE PLENDIS, VANE, PRI LA FAKTO KE LA LIBROTENADO DE SONORILO NE ESTAS TRAVIDEBLA. TIUN SITUACION PLIFORTIGAS PETOJ PAGI MONON AL PRIVATAJ BANKKONTOJ...*

, U kunt steeds een financiële gift doen op mijn bankrekening: 320-0342997-75 met vermelding steun aan Esperanto.

Het boekje kan worden verkregen door storting van 150 Bf (verzendingskosten inbegrepen) op bankrekening 320-0342997-75 van Patrick De Schepper, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk. Men kan

*JEN PARTO DE PROSPEKTO, DE KIU SONORILO HAVIGIS KELKMILOJN DA EKZEMPLEROJ AL „STANDAARD UITGEVERIJ". „KRISTNASKA TRIPTIKO" TAMEN, LAŬ SONORILO MEM, NE ESTAS PLU HAVEBLA...*

lijkheidsgraad loopt geleidelijk op van hoofdstuk tot hoofdstuk en ... een lijst van de nieuw gebruikte woorden. Zeer warm aanbevolen voor beginnelingen. Prijs : 35 fr.

Kristnaska triptiko : Uit het Nederlands vertaald door E. Paesmans. Met illustraties van de schrijver Felix Timmermans. Een vroom verhaal over drie mannen die een speciale kerstavond beleven. 48 blz. 18 cm. Prijs : 70 fr.

Misio sen alveno : Een originele SF-roman geschreven door John Francis. 159 blz. 21 cm. IBN 90-6336-021-5. John Francis is reeds bekend door volgende werken "Vitralo" en "La Granda Kaldrono". Prijs : 420 fr.